




3^a trimestro 2011

En tiu numero vi legos..

Letero el Volgogrado

Valentina Spitsina, la plej fora membro de nia grupo rakontas pri la vivo de sia alia esperanto-grupo en Vladivostoko.	p.1 p.2 p.3
Jen la fino de la tandem vojaĝo de J.-J. Moreau tra la baltaĵ landoj.	p.3 p.4
Denise kaj Jean-Louis Le Brizault partoprenis en Internacia Himalaja Renkontiĝo, ili rakontas la duan parton de sia vojaĝo.	p.5 p.6
Marie-France kaj Jacques Gaumé vizitis la kuirejon de la diino Pele sed nenion povas diri pri la recepto de la kaĉo, kion ili vidis en la giganta kaldrono.	p.7 p.8



Bonan tagon, miaj karaj geamikoj!

De longe ne vidis vin kaj decidis skribi leteron, rakonti pri funkciado de nia esperanta grupo. Ni nomas ĝin: klubo « ESPERANTO »

Kutime ni havas kunvenojn du fojojn monate en ia laborĉambro de loka muzeo "Staraja Sarepta", kaj niaj kunsidoj estas similaj je la viaj "merkredaj konversacioj".

Ni legas fragmentojn el pli gravaj aŭ interesaj artikoloj de rusa esperanta gazeto "Reĝo". Pridiskutas ilin. Aŭskultas diversajn anoncojn kaj proponojn pridiskutas estontan laboron. Ofte iu rakontas pri interesaj faktoj el leteroj, kiujn li ricevis de eksterlandaj geamikoj. Ekzemple mi korespondas kun geamikoj el Francio, Germanio, Finnlando, Serbio kaj Pollando.

Ni montras fotojn, diapozitivon de tiuj klubanoj, kiuj revenis post ia vojaĝo aŭ vizito. Cer-

te, tiuj personoj klarigas, sed bedaŭrinde, ne ĉiam en esperanto.

De tempo al tempo niaj kunvenoj havas formon de festetoj, pli ofte okaze de naskiĝtago de iu. Ni trinkas teon, sukron kaj manĝas biskvitojn, kuketojn. Kelkaj virinoj alportas membakitajn tortojn aŭ kukojn. Ni donacas al naskiĝinto iajn amuzajn memoraĵon, donacetojn. Iam komune, iam persone.

Dum kunvenoj nepre iu pri io rakontas aŭ organizas ian ludon. Faras ni tion ĉi, ĉu povice, ĉu je la deziro, aŭ mi donas al iu taskon ion prepari. Ekzemple, dum februara kunveno ni aŭskultis diversajn variantojn de tradukoj de proverboj. Ankaŭ februare ni lernis vortojn de fama kanto pri Volgo. Tradukis ĝin mia konatulo el apud moskva urbeto. Dum alia kunveno ni legis versojn de famaj poetinoj Anna Aĥmatova kaj Marina Cvjetajeva.

Decembre ni parolis pri kelkaj faktoj el biografio de L. Zamenhof kaj liaj parencoj. Kvar jarojn antaŭe mi mem verkis teatraĵeton

pri Zamenhof kaj ni ludis ĝin dum jubilea kunveno de grupo. Kvar monatoj antaŭ teatroludis ĝin en urbo Uljanovsk niaj geamikoj el loka klubo.

Kun uljanovskvanoj ni amikiĝis tri jaroj antaŭ. Iliaj klubanoj jam trifoje vizitis Volgogradon kaj ni faris por ili ekŝkursojn sur historiaj lokoj de nia fama urbo. Kvar niaj klubanoj (ankaŭ mi) partoprenis en skribkonkurso « Ĉu vi scias multe pri Uljanovsk ? » Estis 25 demandoj. Plej juna (21-jara) nia junulino respondis pli sukcese. Ĉiuj ni multe ekŝciis. Ankaŭ ni sendis fotojn por fotekspozicioj, kiujn ili organizis laŭ diversaj temoj: « Ŝatataj lokoj de urbo », « katoj kaj hundoj », « belaj floroj ».

Nia grupo estas malgranda. Dum niaj kunvenoj pli ofte estas 3 – 7 membroj kaj ni ne malofte konversacias pri kutimaj ĉiutagaj, familiaj problemoj. En junio ni faras piknikon sur bordo de Volgo kaj ĉiam pendas sur apudaj arboj titolon:



Nun mi rakontos pri alia nia agado.

Dum lastaj tri jaroj ni ofte partoprenas en iaj urbaj rimedoj aŭ mem ĝin organizas. Tion ni nomiĝas amuze « Ni por civitanoj ».

En mezlernejo n° 38 nia grupo organizis festivalojn de slavaj lingvoj. Partoprenis pli aĝaj gelernantoj, instruistoj, gepatroj

kaj loĝantoj de apudaj kvartaloj. En jaro 2008 vizitis 140 homoj kaj en jaro 2009 jam estis 170.

Min oni demandas « Ĉiam estas tria ? » Ni planis fari ĝin decembre, poste en februaro, sed ne sukcesis laŭ kelkaj kaŭzoj. Sed nepre organizos ĉar homoj atendas. Al ili ekplaĉis.

Ankaŭ du foje ni organizis ŝakturnirojn en salono de muzeo por oficistoj de muzeo, por iliaj parencoj kaj esperantistoj. Krom tio ni invitis gelernantojn el sporta lernejo partopreni turniroj. En unua partoprenis 30 homoj, en dua 28. Ankaŭ homoj petis fari trian turniron.

Printempe apud kanalo « Volgo – Don » estraro de urbo organizis bonan akcion. Kelkaj centoj de homoj plantis arbojn en parkon anstataŭ jam sekigitajn (insektoj ekmanĝadis). Dek esperantistoj organizite partoprenis en tio ĉi bona afero. Vetero estis bela kaj etoso bona. Kavetoj jam estis fositaj. Ni ricevis po kelkajn plantidojn kaj memoraĵojn. Ni plantis, akvumis kaj ĝojis.

Bedaŭrinde, ne ĉiuj nuntempe kreskas, ĉar somero estas varmega kaj la parko ne estas tre bone prizorgata.

Ĉiam en septembro nia urbo festas « sian naskiĝtagon ». Multe oni organizas en diversaj regionoj de urbo rimedojn. Ankaŭ nia klubo, ĉu sur strato en speciala loko, ĉu en ia kulturpalaco organizas ekspozicion pri laboro de nia klubo kaj pri Esperanto. Apud ĝi iu deĵoras kaj klarigas al homoj, kiuj interesiĝis.

Tiel dum lastaj du jaroj aperis en nia grupo tri novaj klubanoj. Bedaŭrinde de-nove virinoj: 53-jara, 47-jara kaj 21-jara. Post elementaj kursoj ili iĝis aktivaj anoj.

Bedaŭrinde en muzeo ni ne povas fari kursojn pagitajn. Faris ĝin ni hejme kaj komencantoj vizitas 15 – 20 duhorajn lecionojn. Post 4 – 5 monatoj ni ekzamenigas ilin kaj amuze aŭ solene (pli ofte kune) ni dum klubkunveno akceptas ilin en klubo. Ili ricevas ateston.

Estis tempo, kiam ni faris en 6 urbaj bibliotekoj ekspoziciojn pri Esperanto. Po du aŭ tri semajnoj en ĉiuj estis la sama ekspozicio sen deĵorantoj. Ni petis bibliotekistinojn klarigi, respondi je la demandoj, se ili povas.

En lokaj gazetoj kelkfojoj oni skribis pri nia laboro, aŭ mi mem pri Esperanto aŭ pri ia nia rimedo skribis ruse.

En « Rego » ankaŭ mi sendas artikolojn – raportojn pri nia funkciado.

Somere 2 – 5 niaj membroj partoprenas iajn kongresojn, konferencojn, tendarojn, staĝojn aŭ aliajn renkontiĝojn en diversaj urboj de nia grandega lando aŭ ekster ĝi. Certe aperas novaj geamikoj kaj kontaktoj kun ili. Kaj tie klubanoj ricevas bonan paroladan praktikon, pli altigas lingvan nivelon de ili. Ni tre rekomendas tiajn vojaĝojn. Jam elektis en Samaro veturi aprile, en Gelengik (sur Nigra Maro) aŭguste kaj en Kievo (Ukrainio) dum julio po 2 aŭ 3 homoj.

Nun kelkaj vortoj pri mi kaj familianoj. Filo kaj filino laboras laŭ siaj profesioj, sed havas multajn problemojn laŭ ekonomia situacio en lando. Du pli aĝaj generacioj estas studentoj de universitatoj kaj pli juna ekzamenigos, ŝi finas lastan klaston en mezlernejo. Mi instruas gelernantojn po unu persone en mia hejmo. Dezirantoj plibonigi sian nivelon en matematiko estas multe. Mi finas leteron kaj de-

*ziras al ĉiuj bonan sanon kaj feliĉon.
Valentina.*

PERIPLO TRA LA BALTAJ LANDOJ (sekvo)

Post la foriro el Sankta-Peterburgo kaj post cent sep kilometroj, ni tranoktas en la lasta urbo de Rusio. Ĝi nomiĝas VYBORG. En la ĉambro, ni gastigas rusan paron, pli precize, ili enkrakistas nian dormĉambron, la hotelestro sciante nenion. En la tapiŝo, larvoj de vekiĝontaj puloj kuŝas. La rusoj dormas sur ŝveligeblan liton, kiam la edzo movas, la lito bruegas ĉefe kiam la vekiĝontaj puloj pikas. Post memorebla nokto, la korpo de edzo estas plenkovrita de haŭtvezikoj. Dum pluraj tagoj li skrapos sian haŭton.

VYBORG estas urbo malĝoja, kiu suferis tro ofte pro militoj, pro proksimiĝo al Finnlando, multnombraj domoj ruiniĝas. Kial ? Kie loĝas la posedantoj, ĉu ili ankoraŭ vivas... restas por mi multnombraj demandoj sen respondo. Kia fekaĵo, la milito !

Baldaŭ Finnlando aperas. Post landlimo kaj post longaj ĉikanoj de doganistoj, ni trapasas la landlimon. Tuj post rusaj vastegaj senkulturejoj, subite kia miraklo tiu zorgita kamparo. Ĉu la tiea grundo pli fruktodonas ol rusa grundo ? La respondo aperas sur la vizaĝoj de loĝantoj el la du landoj. La tieaj kulturistoj rikoltas tritikon plenigante remorkojn, k. t. p.

Antaŭ memserva magazeno, budo kiu entenas ĉarmajn vendistinojn allogas nin. En ĝi oni aĉetas (mi devus skribi « aĉetadas ») salmonaĵon freŝe fumaĵitan, kiu regalas nin, ni neniam manĝis tian bongustaĵon. Fine ni aprezas bonan vivmomenton. Ni tendumas en LAPPEENRANTA, ĉarma plezurhaveno. Ni vespermanĝas sur teraso ĉe kanalo. La etoso, la vetero, la vivmaniero de gapantoj estas preskaŭ samaj kiel en Francio. Denove ni trovas la vojaĝon kaj la vivon belaj, rapide ni forgesas la malbonajn momentojn.


Post kvar tagoj ni alvenas al Helsinko. La restado okazas en la junulara gastejo. En ĝi, matene, mi ekvidas Esperantiston vestitan per vestaĵo rekonebla pro esperanta frazo. Li estas akompananta sian edzinon. « KIA ĜOJO » por mi. Mi, kiu de ĉiam atendis tian momenton ! Mi alpaŝas ilin kaj ekbabilas kun ili, ŝajne, kiel mi, ili surpriziĝas kaj ege feliĉas. Mi fieras prezenti ilin al miaj amikoj, kiuj de longtempe, mokas min pri nia karega lingvo. Ekde nun mi estos pli kredinda ol antaŭe. Mi notas ilian adreson sur mia jarlibro ĉar mi intencas korespondi kun ili, kiam mi estos reveninta hejmen.

Post tiu porĉiama neforgesebla momento, ni vizitas la urbon. La katedralo faras la famon



de la urbo tiel ĝi estas fotata. De la supro de Senateja Placo, la katedralo superas la urbon. La pureco de blanka ŝtono diferencigas ĝin el la aliaj monumentoj, kvankam ĝia volumeno sufiĉas. La konstruo daŭris dudek du jarojn. Ĝia stilo estas novklasika. Ĝi staras vidalvide al la nacia biblioteko kaj al la Palaco de Registaro.

La mara fortreso SUOMENLINNA estas konstruita de registaro el Svedio por protekti sin kontraŭ la Rusa Imperio. Ni vizitas la tunelojn, la subteraĵojn, vidas kanonojn disekuitajn, ni eniras eĉ en etan submarŝipon. Revenintaj de la mara fortreso, ni vizitas la kirkon TEMPPELIAUKIO, kurioza preĝejo en la roko, la muroj ne estas masonitaj sed tajlitaj en la roko mem. La plafono konsistas el kupraj filamentoj formante kupolon videblan nur ekstere. Interne akustiko bonsonoras.



Por festi la finon de la irvojaĝo, ni manĝas kune. Nur unu restoracio akceptas nin, estas ĉina restoracio. La laboristoj ĉinaj kapablas adapti sin al la peto (ankaŭ imitenda konduto), tial oni ne aŭdas ilin plendi.

Post la vizitado, ni enŝipiĝas por trapasi la Baltan Maron. Ni elŝipiĝas en Germanio, denove ni retrovas la plezuron premi la pedalojn. Ni vizitas la urbon TREVIRO, la romanajn ruinojn, la Porta-Nigra-n (ne necesas traduki tiun lastan vorton). La Romanoj konstruis tiun pordon dum la unua jarcento. Ni malkovras malnovajn stratojn, domojn, kun trabarmuroj zorge skulptitaj kaj farbitaj.

Ni laŭiras la mozelan valon, unu el la plej belaj regionoj, kiun ni vidis dum nia tuta vivo.

La traŭboplana vito kreskas ĉie, riĉigante la vinkulturistojn. Kelkfoje pro kruta klifo por atingi la vinberejon oni devas iri ŝipe. Ĉie, ĉio bonodoras, la ĉirkaŭfarmbienoĵoj montras nenion malnovan ilon dise, tie la disciplino regas ĉie. Ni profitas la okazon por gustumi kaj trouzi la blankan trinkaĵon. Kia plezuro !

Trapasante Luksemburgion ni ne ŝparlokas nian ŝparmonon, la monujoj estante malplenaj (preskaŭ).


La trapaso de Francio okazas bone, la ĉevaloj de nia rajdobesto flarante la stalon. Dum la lasta etapo ni biciklos cent sesdek ses kilometrojn. La kalkulilo indikas proksimume ses mil kilometrojn. Krom la postaĵo, ĉio fartas kaj sanas bonege.

Johano-Jakobo MORO

Vojaĝo en NEPALO

De la 1-a de marto ĝis la 4-a de marto : pied-vojaĝo de Sundarijal ĝis Dhulikel.

Marde la 1-an de marto : Ni foris buse de Kathmandu al Sundarijal iom malfrue matene. Ni estas surloke mezmatene ; estas belega vetero, iom varma (por ni) kaj seka aero. Post nia elbusiĝo, portistoj preparis manĝilojn kaj manĝaĝojn por tagmanĝo. Ili devas porti ĉion dorso ! Estas nekredeble pezaj aferoj ! Kaj ni ekis piede, ni supreniris la montojn pere de stuparoj, la suno brilis kaj oni ŝvitis ! Estis bonhumora estoso. Post la unua ŝtupo, la dua , kaj la sekvantaj....



Ekde la komenco de nia piedirado, ni malkovris etajn vilaĝojn, dometojn, kaj kultivatajn terasojn. La rikoltoj povas esti terpomoj, tritiko, maizo, rizo... La grundo ŝajnas sufiĉe riĉa pro sterko aldonita al la tero. Tiu sterko estas transportita en dorsokorboj. La vilaĝanoj kultivas nur pere de plugpioĉoj. Oni povas imagi kiom estas lacega tia laboro, vivi tie devas esti



malfacile, kaj vilaĝanoj estas ege malriĉaj. Ni vidis dombestojn ĉirkaŭ la farmbieno : kaprojn, bovojn, bubalojn, kokojn. Kiam ni renkontis infanojn aŭ adoltojn, ni diris « Namaste » (estas « saluton » en la Nepala lingvo) .

Alia aspekto de tiu piedirado, ĉiutage, estas konversacioj inter la anoj de la ekstera kaj Nepala grupo. Ni povis interŝanĝi pri niaj kutimoj, paroli pri nia laboro, familio, regiono kie ni loĝas. Estas ege interesa babili esperante. Razen, unu el la Nepalaj organizantoj diras « Mi ege dankas vin por via Esperanto-konversacioj dum la promenadoj. Tio ja estis grava por ni, kiuj malmulte havas ŝancon babili kun eksterlandanoj. » Mi povas aldoni : estas same por ni, ĉar kiam ni estas hejme, paroli esperante inter anoj de la sama lando estas ege malfacila, estas granda tento krokodili inter ni ! Mi opinias ke ĉiuj partoprenantoj progresas dum tiuj renkontiĝoj, dank'al niaj Nepalaj geamikoj.

Ni ĉiam memoros, la unuan vesperon en Ĉisapani : fajro, kantoj kaj dancoj, kaj la sekvanatan matenon je la 6a, la sunleviĝon sur la montaro Himalajo : mirinda spektaklo.

Neforgesebla !



La 5-an de marto, ni veturis buse al Lumibini. Unue estis montara vojo, poste ebena vojo dum la tuta tago. Stiri buson aŭ kamionon sur nepala vojo, estas ege speciala stira-

do kaj necesas hupon en ordo, kiu bone funkcias ! Kiam oni preterpasas veturilon, se alia venas vid-al-vide, ĉiuj devas bremsi krom tiu kiu preterpasas aŭ halti por eviti akcidenton !

Ni tranoktis en Lumbini bamboo hotelo. Ni rimarkis ke la temperaturo estis iom pli alta ol en Kathmandu. Lumbini estas urbo en regiono proksime al la landlimo de Hindio. Estas la naskiĝloko de Siddharta Gautama, la fondito de la Budhismo, kiu vivis de 623 ĝis 543 antaŭ nia epoko. Lumbini estas unu el la kvar plej gravajn pilgrimejoj rilate al la vivo de Budho. Tiu loko estas ekde 1997 Mondheredaĵo de UNESKO.

Matene, la 6-an, ni vizitis la sanktan lokon : unue Mayadevi templon, kaj aliajn konstruaĵojn (germana, korea, ĉina... temploj). Kaj la sankta lageto Pskarini, kie la patrino de Budho, antaŭ lia naskiĝo, banis sin, ankaŭ kie Budho havis sian unuan banon. Apud tiu lageto, staras sankta arbo kaj Asokan kolono. Fine en Mayadevi templo, ni vidis la precizan naskiĝlokon de Budho. Ni renkontis pilgrimantojn el diversaj landoj : koreanajn, malajajn...

Posttagmeze, ni veturis buse al Kapilvastu, 28 km okcidente de Lumbini. Estis Sakya ĉefurbo, kie la princo Siddhartha loĝis dum 29 jaroj.

La 8-an de marto ni estis denove en Kathmandu. Ni vizitis la kvartalon Thamel, kaj butikumis. Vespere okazis la internacia vespero.

De la 9-a ĝis la 11-a de marto, estis postekskurco al Pokhara.

Je la 6a vespere ni atingis tiun urbon apud la lago Phewa. Ni fotis la sunsubiron sur la lago kun la boatoj proksime al la bordo.

La 10-an de marto, ni ellitiĝis frue, ĉar ni rapide iris buse kaj piede al la mon-

teto Sarangkot por admiri la sunleviĝon sur la montoĉeno Annapurna, inter la pintoj : «la fiŝvosto» (Machhapuchhare en Nepalo) kaj la « elefanto ». Tiuj sanktaj pintoj estas en Nepalo.

Post matenmanĝo, ni iris boate sur insulo, kie estas fama hinduista templo Varahi Mandir dediĉita al Vishnu, kiu estas enkorpiĝita kiel apro ! Poste, ni plu iris ĝis la blanka Paca Pagodo, konstruigita de japana organizado Nipponzan Myohoji por disvolvi Pacon tra la mondo.

Posttagmeze, vizito de la Internacia Montaro Muzeo ; ĉi-tie estas ekspozicioj pri historio, kulturo, geologio, plantoj kaj bestoj de la regiono.

La 11-an de marto, antaŭ reiri al Kathmandu, ni ankaŭ vizitis Devi-akvofalon, tre impresan vidaĵon. Ĝi situas proksime al la Gurkha muzeo ; Multe da Gurkha soldatoj estis varbitaj en la Brita armeo pro ilia kuraĝo kaj fideleco.

Poste, ni vidis Begnas lagon, unu el la sep lagoj ĉirkaŭ Pokhara. Tie, ni aŭdis muzikiston, kiu uzis Sarangin. Sarangi estas violono, etna muzikilo de Pokhara regiono.

La 12-an de marto, matene, ni aŭdiauis niajn amikojn Narendra, Razen, Poshraj.... Ek al la fluhaveno. Ni forflugis tagmeze.

Ni flugis laŭlonge de la Himalaja montaro, lastajn miridajn vidindaĵojn el Nepalo !



Jean-Louis kaj Denise Le Brizault

Vizito al la kuirejo de diino Pele



En majo 2011 ni vizitis Romain filon Romain, kiu laboris en Kalifornio. Por ni, li organizis kune kun sia fianĉino Cinzia vojaĝon al insuloj Havajo. De la 9-a

de majo ĝis la 12-a ni vizitis insulon Kauai. La 13-an ni alvenis sur « Big Island » [dika insulo], kie troviĝas aktiva vulkano.

Dimanĉon la 15-an post pluraj haltoj en lokoj kie oni povis observi diversajn aspektojn de malvarmigita lafo ni alvenis post la sun subiro al punkto, kie la aŭtistoj devis halti por respondi al demando de kontrolisto ; tie la vojo estis mallarĝa pro invado de lafo en 1990. Ni ricevis permeson daŭrigi la antaŭeniron. (Pro la angla lingvo kun usona akcento mi komprenis nek la demandon nek la respondon).

Post mallonga distanco ni iris maldekstren sur malebena vojo meze de nigra lafo, sur kiu troviĝis kelkaj domoj dissemataj. Kiam nia aŭto haltis antaŭ ligna domo ni estis tre surprizitaj, tie ni estis nek en urbo nek en vilaĝo kaj tiu domo ne estis hotelo. Afabla paro akceptis nin. Ĉifoje, anstataŭ hotelon, niaj ĉiĉeronoj elektis pere de la reto "Bed and Breakfast" (lito kaj matenmanĝon) .

Post ripoziga nokto, ni ricevis abundan kaj bongustan matenmanĝon. Dume ni babilis kun Charlene [ŝarlin] kaj David niaj gastigantoj pri ilia vivo meze de kampoj de lafo. Ili konstruis per si mem sian domon sur la lafo vomita ekde 1983 de la vulkano Puu Oo, kiu estas kratero flanke de la fama Kilauea. Dum la lasta Marto 2011, la vulkano denove elverŝis lafon, kiu preskaŭ lekis ilian domon. Romain kaj Cinzia multe interesiĝas pri geologio (tio estas la fako de Cinzia). Ili multe parolis pri vulkanoj kaj ĉefe pri la petolanta najbaro Puu Oo. Romain diris, ke li multe ŝatus alproksimiĝi al la aktiva kratero. David konfesis ke de longa tempo li deziras fari tiun viziton, do li rapide pretiĝis kaj kvinope ni piediris sur la malebena lafo en direkto al la kratero. La lafo ne havas ĉie la saman aspekton. Kelkfoje ni

paŝis sur formoj ofte elvokantaj ŝnurojn, ŝtonigitajn membrojn aŭ bestojn. Alifoje ni estis sur krudaj blokoj kun



akraj eĝoj (« lafo aa » laŭ la fakistoj). Okazis ankaŭ ke sub niaj piedoj la lafo krakis kaj frakasigis kiel krusto de meringo. Ni ne sciis kiom profunda estis la kavo, ĉu dudek centimetrojn ĉu unu metron ? Ĉiam ni timis fali en profundan truon kaj vundi nin. Post kelkaj el tiuj krustrompiĝoj ni prudente paŝis sur la rando de tiuj vezikoj.



Je la tria posttagmeze la celo estante ankoraŭ malproksima, saĝe ni decidis rezignacii kaj reveni hejmen. Ni sentis baldaŭ la laciĝon, tamen ni admiris la ŝanĝantajn kolorojn de glata lafo sub la subiranta suno. Ĉirkaŭ la 19-a, la suno tute malaperis sub horizonto ; feliĉe, David prenis tri lampojn el sia dorsosako kaj disdonis ilin al ni. Li telefonis al sia edzino. La marŝo estis tre malfacila ĉar la lampoj ne povis lumigi samtempe la lokon, kien ni metis la piedojn kaj la lokon de la plej bona vojo. Kiam ni vidis la lumon de reflektoroj, ni komprenis ke Charlene venas atendi nin sur la ŝoseo. La ŝarĝaŭto veturis nin ĝis la blua ligna domo, ĉirkaŭ 500 metrojn fore.

Ni estis kontentaj sed tamen ni bedaŭris la maltrafon de la celo. Ni facile komprenis, ke ni ne foriris sufiĉe frue, tamen, la vojo elektita estas tre longa. Ĉu ne eblus alproksimiĝi al la kratero per vojo sur alia flanko ? David informiĝis telefonante al geamikoj, kiuj revas de longa tempo fari viziton al la minacanta najbaro. Ĉar Romain devis konduki Cinzia al fluĝaveno la postan tagon,

ni decidis provi alian ekspedicion merkrede.

Je la sepa matene ni estis akurataj al la rendezvuo proponita de la geamikoj de David. Ni veturis ĝis urbeto situita norde de Puu Oo. Ni lasis la plej belan aŭton en sekura loko kaj daŭrigis la vojaĝon ĝis la fino de asfaltita vojo per la malnova ŝarĝaŭto de David.

Sesope ni penetris en la arbaron. La vojo serpentis inter arboj, kiuj en Francio estas verdaj plantoj por ornamo ĉambrojn. Tie ili havas fertilan grundon, akvon pro ĉiutaga pluvo, kaj varmon dum la tuta jaro. La pado estis tre kuta, ni devis bone atenti, kien ni paŝis por ne gliti aŭ ricevi kutan akvon en la ŝuojn. Kiel indianoj ni marŝis anservice; feliĉe ni ne bezonis distranĉi branĉojn, sufiĉis sekvi rubandojn, kiuj indikis la ĝustan padon.

Scott [skot] kaj Sheryl [ŝeril] marŝis tre rapide: mi ne povis halti por foti. Ni estis trankvilaj ĉar tie vivas nek serpentoj, nek danĝeraj bestoj. Nur kelkaj arakneaj fadenoj ĝenis de tempo al tempo la unuan piediranton. Ni vidis kelkajn sovaĝajn porkojn, kiuj rapide fuĝis.

Post trihora tre rapida marŝado ni haltis ĉe la rando de la arbaro por pikniki sur kuŝantaj trunkoj. De tiu loko ni povis vidi la kulminon de la vulkano. Sen tempoperdo ni daŭrigis nian ekspedicion. La pado ne plu estis tiel facile videbla kiel en la arbaro, baldaŭ ni devis trapasi laŭ « aa ». Poste la irado estis facila, kiam ni marŝis sur la cindroj de la vulkano, kiuj estas helbrunaj laferoj, sed ni alproksimiĝis al nubo de gaso, kiu odoris sulfuron. Tiu gaso estas tre danĝera. Por malgravigi ĝian efikon Romain konsilis al ni meti akvumitan teksaĵon antaŭ nia nazo. David, kiu ne havis naktukon metis ŝtrumpeton! Feliĉe la vento prenis alian direkton. Ni alvenis al la supraĵo je la 12-a 25. Post trapaso de mallarĝaj sed profundaj fendoj la vido estis mirinda. Ni estis sur la rando de giganta kaldrono. 30 aŭ 40 metrojn sube, la kaĉo bolis, ni vidis ruĝajn liniojn sur la surfaco kaj de tempo al tempo



eksplodo forĵetis ruĝan laŭfon plurajn metrojn super. Ni estis ekscititaj antaŭ tiu spektaklo. Ni fotis kaj filmis multe, ĉiam atentemaj por ne fali en

fendojn aŭ en la krateron (tio, kompreneble, estus malboniganta la kaĉon!). Post fotoj de la "konkerantoj" de Puu Oo, ni malsupreniris.



Dum la trairado de la arbaro, la geamikoj de David parolis kaj ŝercis pri nia ekspedicio sed baldaŭ venis dubo: ni ne rekonis la vojon sekvitajn ĉi-matene. Estis malfacile por orientiĝi: ni ne vidis la sunon pro la densa arbaro. Ni devis retroiri dum almenaŭ kvaronhoron. Finfine ĉirkaŭ la 16-a 1/2 ni vidis la aŭton de David. Pluvetis sed neniu plendis; kompare kun tia aventuro nenio gravas!

Marie-France kaj Jacques Gaumé

Spektu vespere (*) "nian" vulkanon ĉe:

<http://volcanoes.usgs.gov/hvo/cams/PCcam/>

*(kiam estas la 18-a en Francio, estas nur la 6-a en Havajo)

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr